8-a Jaro Novembro 1933.

N-ro 3/4 (40). *Aperas dumonate.*

# LA JUNA BATALANTO

Organo de la Internacia
Katolika Junulara kaj Paca Movado

ELDONATA DE

MONDJUNULARO KATOLIKA, MOKA

Redaktoro : D-ro WILHELM SOLZBACHER.

## ENHAVO :

**AD LUCEM. Por la frata unueco inter la rasoj** (de Wilhelm Solzbacher). — **Tendaro de katolika junularo en la Pireneoj** (de René Nouat). — **La Katolika Junularo en Madagaskaro** (de Pastro De La Devèze). — **Laŭdo kaj mallaŭdo.** Rigardo en la tempon. — **Internacia Junulara Agado.** Katolika Junularo — Politika interkompreniĝo. — Mondkongreso de la Junularo kontraŭ la Milito. — **Vagantaj Infanoj en Usono** (el « Jeunesse Ouvrière »). — **La Esperanto-Movado.** — **Nia Movado.** — **Kie oni parolas pri ni.** — **Leterkesto.**

REDAKCIO : **77, Montée de Pilate, Luxembourg-Eich.**

Eldonejo : ELDONA KOOPERATIVO LA JUNA BATALANTO,

77, Montée de Pilate, 77, Luxembourg-Eich, Luksemburgo.

Presejo: Imp. DISONAISE, J. Winandy, Dison. (Belgujo)

# Abonprezoj de " La Juna Batalanto „

Normala abonprezo : jare 2 germanaj markoj, kun MOKA-membreco 3 M. La eldonejo akceptas monbiletojn, ĉekojn, poŝtmandatojn, respondkuponojn, aŭstrajn, belgajn, francajn, germanajn, luksemburgajn poŝtmarkojn.

| Lando | jara abono | kun MOKA-kotizo | simpla kotizo | Lando | jara abono | kun MOKA-kotizo | simpla kotizo |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Anglujo | 3 s | 4 s | 1 s 3 d | Hungarujo | 3 p | 4 p | 2 p |
| Argentino | 1,50 p | 2 p | 1 p. | Italujo | 9 l | 14 l | 5 l |
| Azio | 3 s | 4 s | 1 s 3 d | Japanujo | 3 s | 4 s | 1 s 3 d |
| Aŭstralio | 3 s | 4 s | 1 s 3 d | Jugoslavujo | 30 din. | 40 d | 15 d |
| Aŭstrujo | 3,40 s | 5 s | 2 s | Litovujo | 5 lit. | 7 l | 3 l |
| Belgujo | 3,50 b | 6 b | 2 b | Luksemburgo | 18 fr | 25 fr | 10 fr |
| Brazilio | 4 mr | 5 mr | 2 mr | Meksiko | 0,50 dol | 0,75 d | 0,30 d |
| Ĉeĥoslov. | 16 kr | 20 kr | 10 kr | Nederlando | 1.25 fl | 2 fl | 0,80 fl |
| Danujo | 2 kr | 3 kr | 1 kr | Polujo | 4z l | 6 zl | 3 zl |
| Danzig | 2 g | 3 g | 1,20 g | Portugalo | 8 esc | 12 e | 5 esc |
| Francujo | 12 fr | 18 fr | 6 fr | Rumanujo | 80 lei | 100 l | 40 lei |
| Germanujo | 2 M | 3 M | 1,20 M | Svedujo | 2 kr | 3 kr | 1 kr |
| Grekujo | 38 dr | 50 d | 15 dr | Svisujo | 2,50 fr | 4 fr | 1,50 fr |
| Hispanujo | 5 p | 8 p | 2 p | Usono | 0,50 dol | 0,80 dol | 0,30 dol |

Ni akceptas ankaŭ pagojn por duona jaro aŭ kelkaj jaroj. Membroj de MOKA ricevos ankaŭ aliajn publikigaĵojn. Donacoj por la subtena kaso (liverado de J. B. al malriĉuloj) estas invitataj.

*Abonejoj* : Krom al la eldonejo oni povas ankaŭ pagi al la naciaj sekretarioj de MOKA.

*Poŝtkontoj*. Germanujo : Köln 480 37 (Dr Wilh. Solzbacher. Köln-Dellbrück); Francujo : Strasbourg 8180 (P. I. A. Muffang, Bourg-la-Reine); Aŭstrujo : Wien D 12 017 (Katholisches Kreuzbündnis für Oesterreich, Ortsgruppe Heiliges Feuer); Svisujo : Luzern VII. 2030 (Schweiz. Kath. Jungmannschaftsverband, Zug); Belgujo : 3318.51 (Imprimerie Disonaise, M. Jean Winandy).

*Ĉeĥoslovakujo* : 15.132 (Ustredie slovenskych katolickych skautov pre Slovensko, Bratislava.

## AĈETU KAJ DISVASTIGU NIAJN PROPAGANDFOLIOJN KAJ BROŜUROJN!

**Mondjunularo Katolika,** kvarpaĝa informilo pri celo, historio, organizo kaj agado de MOKA (en Esperanto), 10 ekz. 0.25 RM, 50 ekz. 1.— RM.

**Les Œuvres Internationales de Jeunesse Catholique**, 40-paĝa broŝuro en franca lingvo, 2 fr. fr. (0.35 RM.).

**La Jeunesse Mondiale Catholique,** kvarpaĝa varbilo en franca lingvo 10 ekz. 1 fr. fr. (0.20 RM), 50 ekz. 4.— fr. fr. (0,70 RM).

**Dans 60 pays,** dupaĝa varbilo en franca lingvo, 25 ekz. 1.50 fr. fr. (0.25 RM).

**Towards an International Catholic Youth and Peace Movement,** kvarpaĝa varbilo en angla lingvo. 10 ekz. 5 d, 8 c (0.25 RM), 50 ekz. s 1/6, dol. 0.25 (1.— RM).

**Die katholische Jugend lernt Esperanto.** Kvarpaĝa varbilo por Esperanto (en germana lingvo). 50 ekz. 0.80 RM, 100 ekz. 1.50 RM.

**Die Katholische Weltjugendliga.** Moderna informa broŝuro pri MOKA en germana lingvo, aperinta 1932, 12 paĝa. 0.15 RM, 5 ekz. 0.50 RM.

**Die Katholische Weltjugendliga.** 16 paĝa broŝuro aperinta 1919. Plej bona informilo pri la historio de nia movado. 0.10 RM.

**Wir Katholiken und die internationale Jugendbewegung.** Von Hanns Sappl. 48 paĝa broŝuro aperinta 1921 kun antaŭparolo de episkopo Majlâth, protektoro de MOKA. Grava por ĉiu, kiu deziras ekkoni la originojn de la MOKA-movado. 0.20 RM.

**Eldonejo LA JUNA BATALANTO, 77, Montée de Pilate, 77, Luxembourg-Eich, Luksemburgo.**



# Ad Lucem.

### Por la frata unueco inter la rasoj.

Kiam milionoj adoras la idolojn de la nacio, raso aŭ klaso kaj kiam ankaŭ multaj kristanoj ŝanceliĝas, tiam oni estas speciale ĝoja, se oni trovas eksterordinarajn formojn de kristana frateco. Apud la frontoj de la malamo kaj kolektiva egoismo kreskas silenta fronto de la amo kaj interpaciĝo, sen multe da bruo, kun decida volo, ne kliniĝi antaŭ la idoloj de nia epoko, sed konfesi la universalan kristanan fratamon, pri kiu Sankta Paŭlo parolas, dirante, ke tie « ne povas esti greko kaj judo, cirkumcido kaj necirkumcido, barbaro, skito, sklavo, liberulo, sed Kristo estas ĉio kaj en ĉio » (Kol. 3,11). Multaj signoj de tia renoviĝo el la plej profundaj fontoj de la katolika kristanismo vidiĝas al la atenta observanto kaj donas novan esperon al tiuj, kiuj tremas, rigardante la teruran materian kaj spiritan situacion de la mondo.

Pri unu el tiuj ĝojigaj signoj mi intencas rakonti, pri movado naskiĝinta el la katolika junularo « por la frata unueco inter la rasoj ». En la lasta semajno de julio 1933 la ĉefepiskopa seminario de la franca katedralurbo Reims gastigis en siaj muroj strangan kunvenantaron. Nur malplimulto estis eŭropanoj. Ĉeestis ĥinoj, japanoj, hindoj, anamanoj, siamano, malgaŝoj el Madagaskaro, arabo, negroj el Afriko kaj Ameriko. Du rusoj, unu anglo, unu germano kaj aro da francoj kaj belgoj kompletigis la bildon. Eble estas menciinde, ke ankaŭ unu katoliko de juda deveno ĉeestis. Ni estis apenaŭ 50 personoj, tamen ni reprezentis ĉiujn kvin kontinentojn. La plej multaj partoprenantoj estis studentoj, kelkaj estis profesoroj, advokatoj, kuracistoj, verkistoj, ses estis pastroj, el kiuj unu hindo kaj unu libanonano. La movado AD LUCEM (« Asocio de Laikoj Universitataj Katolikaj kaj Misiaj por la Frata Unueco inter la Rasoj » estas la kompleta nomo) havas kiel prezidanton Kardinalon Liénart, episkopon de Lille. La Sankta Patro vidis kun granda kontenteco la programon de la studsemajno de Reims kaj sendis sian specialan benon, krome la kunveno ricevis kuraĝigan leteron de la Propaganda Kongregacio en Romo.

La tagoj de Reims restos neforgeseblaj al ni ĉiuj. Ni estis kvazaŭ komploto de la kristana frateco kontraŭ la antaŭjuĝoj de idolana mondo. Jen ĥino kaj japano amike interparolis. Tie grupo konsistanta el unu franco, unu belgo, unu ruso kaj du negroj diskutis gravan problemon. Tie ĉi libanona pastro montris la katolikan literaturon arablingvan eldonitan en lia lando. Aliloke germano klarigis al studento el Siamo la elementojn de Esperanto. Ĥino el Nederlanda Hindujo kantis anglan kanton, kaj negro el la Insulo Martinique prezentis usonajn kantojn de negrosklavoj. — Ĉiumatene la kapelo unuigis la varian aron al sankta meso, kaj Mgr. Vaneufville el Romo per prediko pri la mistika korpo de Kristo metis la religian bazon por la laboro de la tago.

Pri la gravaj paroladoj kaj raportoj mi ne volas multe diri. P. **Delos** O. P., profesoro de internacia juro en la Katolika Universitato de Lille, Prof. **Maklakoff,** filo de iama rusa ministro, konvertito kaj profesoro en la sama universitato, P. **Arnou** S. J., ĝis nun en la Internacia Labor-Oficejo en Genève, D-ro H. C. E. **Zacharias,** kiu vivis 30 jarojn en Hindujo inter la bramanoj de Poona, k. a. faris fundamentajn paroladojn; kompetentajn raportojn pri la familiaj kaj socialaj cirkonstancoj kaj pri la raskonfliktoj en la diversaj landoj ni aŭdis de partoprenantoj el tiuj landoj mem, de Japanujo ĝis Usono, de Germanujo ĝis Madagaskaro, de Hindoĥinujo ĝis la afrika Ormarbordo. Oriento kaj Okcidento en siaj rilatoj unu al la alia kaj al la kristana kulturo estis studataj.

Kio do estas AD LUCEM, kaj kiel ĝi volas labori? Ĝin fondis kelkaj katolikaj junuloj francaj kaj belgaj, kiuj volis dediĉi sian tutan vivon al tiuj landoj, kiujn oni kutime nomas « misiaj regionoj ». La situacio tie estas danĝera. Ĉie estiĝas naciistaj kaj revoluciaj movadoj, kaj anstataŭ entuziasmo por la okcidenta civilizo leviĝas malkonfido kaj malamo. La bonajn aferojn, kiujn la misiistoj alportis al tiuj landoj, ofte estas malhelpitaj aŭ eĉ detruitaj per la eksplua-

temo kaj profitemo de aliaj blankuloj. « Afriko eltenis tri jarcentojn da sklavkomerco, ĝi ne eltenos kvindek jarojn da civilizo » diris Barono Mandat-Grancey. Kaj maljuna misiisto revenanta el Hindoĥinujo post 30-jara misia agado, diris : « Post 20 jaroj la Ekstrema Oriento estos aŭ katolika aŭ bolŝevista ». La misioj mem adaptiĝas al la kriza situacio, evoluigante pli kaj pli la indiĝenan pastraron, por ke la misioj neniel estu identigataj kun politikaj celoj aŭ kun la pretendata supereco de la blanka raso. Sed kio estas farota en tiuj rondoj, kie la malkonfido kaj malamo jam tiom progresis, ke pastroj havas nenian eblecon aliri? Tie laikoj estas bezonataj!

La membroj de AD LUCEM ne volas « interesiĝi » pri la misioj aŭ kolekti monon, ili volas doni sin mem. Ili volas iri en la malproksimajn landojn, ne por gajni monon, ankaŭ ne por fari rekte misian laboron, sed por vivi inter la tieaj popoloj kiel laikoj, por helpi kaj servi ilin, por vivi en intima kontakto speciale kun la intelekta elito kaj por kreskigi per sia vivo kaj sia sociala agado kristanan fratecon, kiu iom post iom povas forigi la malamon kaj malkonfidon de tiuj, kiuj ofte mem estas senkulpaj pri tio. Ili volas eviti la kontakton kun la tieaj blankuloj, akcepti la vivkutimojn, la kostumon kaj la lingvon de la lando kaj malegoiste meti siajn kapablecojn en ĝian servon. Ili volas tiel iom ripari la gigantan kulpon de la blankaj nacioj, kiuj detruis malnovajn kulturojn, senhonte ekspluatis la ekonomiajn fortojn kaj dronigis tutajn landojn en sango kaj larmoj. Ili volas iri kiel pioniroj ankaŭ en tiujn rondojn, kiujn infektis la materialismo, ateismo kaj bolŝevismo importitaj el Eŭropo. Ili volas tien iri kiel amikoj kaj fratoj kaj klopodi, per sia vivo kaj ekzemplo iom influi la pensadon de la aliaj.

Por prepari la aktivajn membrojn de AD LUCEM, estas fondita Instituto en Lille sub direktado de Pastro Tonneau O. P. kaj D-ro Zacharias. Tie la junaj eŭropanoj vivos unu jaron kune kun junaj studentoj orientaj, negraj ktp. Iom post iom oni volas krei en kelkaj landoj « hejmojn » de AD LUCEM, kie junuloj de diversaj rasoj renkontiĝas por lerni kompreni kaj ami unu la alian. La membroj ne havas iluziojn pri la facileco de sia tasko. Eble ne ĉiuj restos firmaj kaj fidelaj. Sed Kristo vokas — en ĉiam novaj formoj. Li venkos. Eĉ se la okcidento perdas en siaj bomboj kaj venengasoj, eĉ se la kristanaro fiaskas, — Dio povas elekti al si novan kristanaron, kaj en Azio aŭ Afriko povos estiĝi kristana kulturo el novaj freŝaj fontoj.

Ne ĉiu estas vokata, fariĝi aktiva membro de AD LUCEM. Sed ni ĉiuj povas kulturi en ni la spiriton de tiu movado. Ni detruu en ni la naciajn kaj rasajn antaŭjuĝojn, ni forigu la kondamnindan fierecon, ni respektu kaj amu unu la alian, tute egale ĉu ni havas blankan, flavan aŭ nigran haŭton, ĉu ni apartenas al granda aŭ malgranda nacio. Ni fariĝu veraj kristanoj! Tiam ni ne bezonas perdi la kredon, ke sur ĉi tiu tero kreita de Dio kreskos nova pli granda kristanaro!

Wilhelm SOLZBACHER.

---

## Tendaro de katolika junularo en la Pireneoj.

La kristana koncepto pri la paco estas belege studita de la Franca Katolika Junulara Asocio (A. C. J. F.) en sia granda kongreso de pasko 1933 en Lyon. Tiu programo devas esti praktike evoluigata per internaciaj interŝanĝoj, korespondado, renkontiĝoj. Legantoj de LA JUNA BATALANTO, kiuj intencas iri al Francujo, certe interesiĝos pri bela iniciato de la regiona unuiĝo de Bordeaux de la A. C. J. F.

La katolika junularo de Bordeaux fondis antaŭ 10 jaroj belegan tendaron tute proksime al la sanktejo de Lourdes, 1600 metrojn alte en la valo de Barèges. Ĝia eksterordinare ĉarma situacio je la eniro de du arbaroj kaj apud la glaciejoj de Néouvielle certigas al ĝi ĉiam pli multnombrajn vizitantojn. Ekskursoj kun kompetentaj gvidantoj kondukas en la regionon de la pireneaj lagoj (lagoj de Aumar, Aubert, Orédon) kaj eĉ al Hispanujo en la aragonajn valojn (valo de Arazas). La tendaro konstruita el tre solidaj tendoj estas malfermata de la komenco de julio ĝis la fino de septembro, la restado kun plena nutrado kostas nur 18 fr. fr. potage aŭ 15 fr. fr. por junuloj venantaj grupe.

De tri jaroj, Barèges servas en aŭgusto kiel renkontejo de la J. E. C. (Katolika studanta junularo), kies membroj tie komune priparolas siajn spertojn kaj esperojn. Viglaj studrondoj diskutas seriozajn problemojn, kaj la gajeco ne perdas siajn rajtojn en la ĝojofajroj kaj sub la grandaj tendoj. Barèges ne volas esti simpla renkontejo alpinista. Ĝi havas fortikan doktrinon kiel bazon kaj dediĉas sin fervore al la defendo de la socialaj kaj internaciaj ideoj de la Eklezio. La starigo de kapeleto ankoraŭ plifortigis ĝian spiritan vivon.

Barèges estas esence « frataro », tie naskiĝis daŭraj amikecoj. La tendaro volas fariĝi centrejo de juna kristanaro, kie junaj katolikoj el ĉiuj landoj unuiĝas ne en vaga sentimentala pacifismo, sed en la sama kristana amo.

Jam ĉiujare suprengrimpas al ni junuloj el Hungarujo, Polujo, Germanujo, Anglujo, kaj ni deziras, ke la MOKA-anoj retenu en sia memoro tiun nomon karegan al la francaj katolikaj studantoj, kiuj batalas por la paco, kaj ke ili venu multnombre por paroli kun ni, je la limo inter la franca kaj la hispana popolo, pri tiu vivo, pri tiu doktrino de la Eklezio, pri kiu ni estas fieraj kaj kies militantan kuraĝon ni devas havi.

Amikoj ĉiulandaj, ne forgesu por julio-aŭgusto-septembro 1934 la tendaron Bernard Rollot en Barèges (Hautes-Pyrénées)! Viaj junaj francaj amikoj deziras, ke dank' al vi estiĝu en ilia lando unu el la unuaj internaciaj tendaroj oficiale katolikaj, kie ni ĉiuj frate kunvivas sub la signo de la kruco. Ĉiujn informojn mi volonte donas.

René NOUAT,

21bis. rue Voltaire, Paris (XI.)



---

## La Katolika Junularo en Madagaskaro.

(FINO.)

La plej signifa rolo de la asocio estas la **praktika apostolado.** Ĝi estas duforma : reciproka helpo kaj agado ekster la limoj de la grupo.

La reciproka helpo kaj vera frateco inter la membroj ofte pruviĝas, speciale se membro estas malsana. Tiam la aliaj flegas lin, zorgas pri vizito de pastro kaj kuracisto, faras lian laboron sur la kampoj.

La misioj ricevas grandan helpon. En multaj kazoj aroj da junuloj venis por senpage helpi en la konstruo de preĝejoj aŭ religiaj institutoj. Ankoraŭ antaŭ nelonge, kiam la Seminario de Sankta Petro estis konstruata, oni vidis tutajn vilaĝojn, instigitajn de siaj « junularoj », kiuj venis, kun fosiloj sur la ŝultroj, por ebenigi la terenon.

La junularaj grupoj okupiĝas aktive pri la **religia instruado.** La asocio nun havas inter siaj 8.981 anoj 808 libervolajn **katekistojn**, kies laboro ne estas bagatelo. Junaj laboristoj aŭ oficistoj oferas sian vesperan libertempon, por instrui la katekismon al aroj da infanoj aŭ al maljunaj laboristoj laciĝintaj per la taga laboro!

Ni devas ankaŭ atenti pri la **gazetaro.** En la ĉefurbo aperas ĉ. 30 semajnaj aŭ duonsemajnaj ĵurnaloj, el kiuj 5 estas redaktataj en franca, la aliaj en indiĝena lingvo. Deko estas publikigata de protestantaj misioj aŭ iliaj junularaj asocioj, kaj la aliaj, escepte kvar aŭ kvin, apartenas al privataj personoj simpatiantaj al la protestantismo. Ĉiu el tiuj ĵurnaloj havas eldonnombron de 2.000 aŭ 3.000. La katolika misio, kies presejo estiĝis en 1865, fondis sian unuan gazeton en la jaro 1874. Diversfoje reformita kaj plibonigita, ĝi estis

subpremata de la registaro en la jaro 1909 (per dekreto de S-ro Augagneur). En 1911 ĝi estis revivigata sub alia nomo, kaj hodiaŭ **Feo ny Marina** (Voĉo de la Vereco) havas eldonnombron de 11.000 ekzempleroj. La redaktoro diris, ke li trovas la plej bonajn kunlaborantojn kaj propagandantojn inter la membroj de la junulara asocio. Depost aprilo 1920 la katolika junulara asocio ankaŭ posedas propran monatan gazeton por siaj membroj. Krome en 1928 ĝi fondis malgrandan apologetikan, literaturan kaj sciencan revuon **Fahazavana** (Lumo), kiu monate aperas kun eldono de 1.500 ekzempleroj. Kaj en la lasta tempo la junuloj eĉ fondis **semajnan** ĵurnalon **Lakroa**, kiu havas 4.650 abonantojn. Tiuj ĉi iniciatoj de junaj spiritoj estas speciale gravaj en tempo, kiam socialismo kaj bolŝevismo ĉie klopodas enpenetri per la gazetaro.

Alia formo de propagando estas la **teatroludo**, kiu altiras grandajn amasojn el la loĝantaro katolika kaj nekatolika.

El la **sociala** kaj **karita** agado ni nur menciu la vizitojn al la **lepruloj**. Fari bonon al tiuj, kiuj suferas de tiu terura malsano, estas tre kristana faro. Grupoj de la katolika junularo iras en la leprovilaĝojn, alportas almozojn kaj provas per muziko kaj kantado porti iom da ĝojo en la vilaĝojn de la teruro.

La ĉefa malhelpo de la katolikismo en Madagaskaro estas la **manko de pastroj**. Kun kreskanta nombro de **indiĝenaj pastroj** ankaŭ la katolika junularo de Madagaskaro fariĝos pli kaj pli fruktodona en sia agado.

Doninte detalan priskribon pri la Asocio de la Malgaŝa Katolika Junularo, ni devas ankoraŭ mallonge paroli pri du aliaj institucioj : la **Mpanjono** kaj la katolikaj skoltoj.

**Mpanjono** signifas « fiŝkaptistoj », kaj vere la junaj Mpanjono volas esti « kaptistoj de homoj » inter siaj kamaradoj. Ili estas studentoj en la ĉefa ŝtata supera lernejo, ĉiuj sekcioj (medicina, instruista, topografia, administra, publiklabora, poŝta-telegrafa) estas reprezentitaj. La grupo fondiĝis en la jaro 1913 kun 30 membroj, rekomencis post la milito sian agadon en la jaro 1920 kun 64 membroj, havis 96 membrojn en 1925, 130 membrojn en 1930, do iom pli ol kvaronon el la tuta studentaro. Ĉiudimanĉe okazas meso kun komunio, poste konferenco, posttagmeze katekismo; ĵaŭde la pastra gvidanto faras paroladon kaj respondas al demandoj pri iaj malfacilaĵoj; ĉiujare okazas spiritaj ekzercoj. Post fino de la studoj kelkaj membroj jam faris gravajn servojn al la katolikismo; speciale tiuj, kiuj ricevas postenojn en la ŝtata administrado, estas tre gravaj, ĉar ĝis nun tie regis sufiĉe kontraŭkatolika sinteno. En kelkaj kazoj la misiistoj devis moderigi la fervoron de estintaj Mpanjono, kiuj, fariĝinte ŝtataj instruistoj, volis kontraŭregule instrui la katekismon al siaj lernantoj aŭ ties gepatroj.

La katolikaj skoltoj fondiĝis en Madagaskaro en la jaro 1923, unue inter la francoj kaj poste inter la malgaŝoj. Jam en 1926 oni vidis en la Corpus Christi-procesio en Tananarivo francajn kaj malgaŝajn skoltojn frate unuigitajn, kiuj faris la servon de la ordo. Jam kelkaj el la malgaŝaj skoltoj vizitis Eŭropon. La skoltismo trovas multe da simpatio en Madagaskaro kaj certe bone evoluos, kvankam ĝi ankoraŭ estas tre malforta laŭnombre : la statistiko parolas pri 28 eŭropaj kaj 40 indiĝenaj skoltoj katolikaj.

P. DE LA DEVÈZE
(laŭ « Annales de la Jeunesse Catholique »).

---

KOLEKTO POR PLIFORTIGI J. B. : **Nur malmultaj geamikoj ĝis nun atentis nian alvokon en la maja numero. Relegu ĝin! Kaj sendu al ni krizdonacon por la grava kolekto! En la venonta numero de J. B. ni komencos la publikigadon de alvenintaj donacoj.**



# LAŬDO KAJ MALLAŬDO.

**Rigardo en la tempon.**

*Kanonkomercistoj nedezirataj en... Turkujo.* S-ro Lauder, reprezentanto de la granda angla firmo Vickers, Armstrong & Co, estas elpelita el Turkujo la 2 aŭgusto, kiam li ĵus revenis el Anglujo al Ankara. Pri la esencaj kaŭzoj de tiu ago la turkaj aŭtoritatoj ĝis nun silentis. S-ro Laŭder devis vole nevole preni la vagonaron al Sofia, kaj, por esti certa, ke li vere foriris, policisto akompanis lin al la landlimo, kie li ĝentile deziris al li bonan vojaĝon. — Imitinda ekzemplo! Se ĉiuj ŝtatoj agus same rilate al la armilokomercistoj kaj iliaj agentoj, la Malarmada Konferenco progresus pli bone, kaj la sorto de la popoloj estus malpli minacata.

*La Internacia Unuiĝo de Patriotaj Pacifistoj* fondita en Francujo celas la enkondukon de preciza difino de la atakmilito en la internacian juron. Ĝi sendis alvokon al la membroj de la Ligo de Nacioj. Jen la plej gravaj frazoj : — Estas necese aldoni al la Pakto de Paris simplan, klaran kaj precizan difinon de la atako, por certigi pli grandan efikecon al la senrajtigo de la atakmilito. Tiu aldono estas urĝe bezonata, por ĉesigi la sofismajn argumentadojn, kiuj permesas al iu nacio forte armata, buĉadi la enloĝantojn de alia ŝtato en ilia propra lando, pretendante respekti la Pakton. La mortigado estas prezentata kiel simpla polica ago kontraŭ « rabistoj », « banditoj », « por protekti la posedaĵojn kaj personojn de la ŝtatanoj » de la nomita nacio ktp.. Oni difinu la atakon kiel invadon de unu lando per la trupoj de alia nacio. Ĉiu armeo eniranta fremdan landon devus do esti konsiderata kiel farinto de krimo. Oni difinu aliflanke la rajtigitan defendon kiel la agadon de trupoj repelantaj el sia lando fremdajn invadantojn. — Ni profetas al la interesa movado nenian sukceson. Politikistoj kaj diplomatoj ne ŝatas simplan logikon.

« *Por reĝo kaj lando* ». La fama debata societo de la mondkonata universitato Oxford, Oxford Union, akceptis la 9 februaro 1933 rezolucion : — En neniaj cirkonstancoj ni batalos por reĝo kaj lando ». — La rezolucio kaŭzis viglan diskutadon, konsentojn kaj protestojn, en la publika opinio. En nova kunveno de la studentoj la kontraŭuloj provis forigi la rezolucion. Oni nove voĉdonis la 2 marto, kaj tiun fojon la rezolucio estis denove akceptata, per 750 kontraŭ 138 voĉoj. Estiĝis vigla movado, kiu akceptigis similajn rezoluciojn de la studentoj de aliaj universitatoj en Britujo, Usono kaj Novzelando. Kelkaj universitatoj oficiale malpermesis al siaj studentoj fari ion similan, inter ili la Senato de la Katolika Universitato de Louvain (Belgujo). — Sendube tiaj ribelaj deziresprimoj de studentoj ne estas tre afablaj. Sed kiu rajtas riproĉi ilin, ke ili pli serioze akceptas la solenajn deklarojn de la Kellogg-Pakto ol la oficialaj politikistoj? Se la milito estas krimo, kiel la Pakto solene diras, kial junuloj ne rajtus rifuzi partopreni en tia krimo?

*Mortigistoj estas honorataj.* Antaŭ 12 jaroj en Germanujo la katolika ministro Matthias Erzberger estis mortigita de 12 kugloj pafitaj de la naciistoj Schulz kaj Tillessen. Ili sukcesis forkuri eksterlanden. La nacisocialista Germanujo permesis al ili reveni kaj preskaŭ triumfe akceptis ilin, kiel ĝi ja ankaŭ starigis oficialan monumenton al la fimortigintoj de alia germana ministro Walther Rathenau. Jen kion skribis la nacisocialista ĵurnalo de Karlsruhe : « La nova Germanujo konfesesprimis sin por la juĝistoj de Walther Rathenau, Fischer kaj Kern, kaj tiel por ĉiuj tempoj eternigis ilian memoron en nia nacio. Antaŭ tiuj nomoj Fischer kaj Kern, kiuj bedaŭrinde falis tro frue, staras Schulz kaj Tillessen, kiuj forigis unu el la plej grandaj malutiluloj de Germanujo, kiun la tuta germana popolo rigardas kiel perfidulon. Estas juste, ke ni gratulu tiujn pionirojn de la naciista ideo. » — Ni nur rememoru, ke Erzberger, al kiuj la germanaj katolikoj ŝuldas multe de la granda influo, kiun ili havis depost la milito, estis ankaŭ unu el la unuaj helpantoj de la katolika paca movado. Kiam en la jaro 1916 Pastro Magnus Jocham publikigis sian libron « Ni kristanoj kaj la papa pacprogramo » kaj la militaj aŭtoritatoj konfiskis la libron, Erzberger atingis per specialaj klopodoj la retiron de la malpermeso. Li tiam skribis al Pastro Jocham : « Vi povas esti fiera, ke vi donis la ĝustan devizon en ĉi tiu furiozeco kaj uragano. Vi estas tute prava, la kulpon ne havas la papo, sed liaj filoj, kiuj ne sekvas lin. Ni estu kunbatalantoj en ĉi tiuj malfacilaj tempoj! La homaro dankos nin, kaj la bona Dio benos nian laboron! »

*Bankoj kaj sociala respondeco.* En la jarkongreso de la amerikanaj bankistoj aperis neinvitite la prezidanto de la Rekonstrua Financa Korporacio, generalo Jones. Li anoncis, ke la registaro mem prenos la gvidadon de la bankoj en siajn manojn kaj degradigos la nunajn bankprezidantojn al sendknaboj, se ili ne pruntedonas grandanime siajn likvidajn sumojn kaj efike subtenas la rekonstruprogramon. — Imitinda ekzemplo!

*Junulargastejoj kaj netoleremo.* — En Francujo nur malrapide disvastiĝis la ideo kaj la praktika realigo de la junulargastejoj, kiuj en Germanujo kaj kelkaj aliaj landoj jam estas tiom imitinde organizitaj. Marc Sangnier, la konata katolika pacifisto, iniciatis la movadon kaj fondis la Francan Ligon por la Junulargastejoj. Iom post iom preskaŭ 30 junulargastejoj estas fonditaj. Ĉiuj gejunuloj, sen diferenco pri politikaj kaj religiaj opinioj, estas akceptataj kun sama afableco. Nun subite fondiĝis konkurenca organizaĵo : la Laika Centrejo de la Junulargastejoj, speciale subtenata de la Nacia Instruista Sindikato. Kial tiu bedaŭrinda disigo? El la gastejoj de la Ligo kelkaj apartenas al katolikaj grupoj. En la hejmoj troviĝas religiaj emblemoj. De la nekatolikaj vizitantoj oni atendis nenion alian ol ĝentilan respekton de la religia konvinko de la katolikoj. La gastejoj akceptas tute same la nekatolikojn kiel la katolikojn. Sed pro tiuj religiaj emblemoj, kies ĉeeston oni ne povas toleri, nova organizaĵo estas fondita, kiu detruas la unuecon kaj malhelpas la estontan disvastiĝon de la junulargastejoj. La malamo kontraŭ la religio estas pli granda ol la kompreno pri la komunaj taskoj de la junularo...

*Unupota manĝo.* Interesa kaj laŭdinda afero estas farata de la nova germana registaro. Alvokante al granda vintra helpkolekto « kontraŭ malsato kaj malvarmo », la Hitler-registaro postulis de la tuta popolo, ke en la unua dimanĉo de ĉiu monato ĉiuj germanoj sendiference manĝu tagmeze nur simplan unupotan manĝon kaj donu la ŝparitan monon por la suferantaj senlaboruloj kaj malriĉuloj. Tio estas trafa kaj videbla signo de granda solidareco. Se tiu solidareco vere ĉie en la mondo ekzistus kaj se tiuj kiuj fartas bone, vivus iom pli simple, por helpi la aliajn, la situacio estus malpli senespera.

*La hindaj katolikoj kaj la kastoj.* En Hindujo unu el la plej fortaj kaj plej danĝeraj institucioj estas la kastoj. La plej bonaj hindoj delonge batalas kontraŭ la kastaj antaŭjuĝoj, sed ne sukcesis detrui ilin. Bedaŭrinde ankaŭ la katolikoj ne estas liberaj de tiuj antaŭjuĝoj. Jam la unuaj misiistoj estis devigataj starigi du kastojn da pastroj, por povi atingi la altajn kastojn kaj la netuŝeblulojn. Ankaŭ en katolikaj preĝejoj la « netuŝebluloj » ne rajtas esti apud la altkastuloj, sed havas apartajn lokojn. Tamen neniam mankis forta movado celanta detrui tiujn idolanajn barojn inter katolikaj fratoj. Ni ĝojis legi alvokon de kelkaj tre altrangaj katolikoj el Trichinopoly. Ĝi montras gravan danĝeron kaj alvokas al helpo. « Kelkaj bonaj kaŭzoj postulas starigi egalecon inter ĉiuj partoj de la komunumo en niaj preĝejoj kaj institucioj. Unu kaŭzo estas la grava danĝero por la kredo de tiuj katolikaj netuŝebluloj. Ateistaj propagandistoj ekspluatas por siaj celoj la sentemecon pri ilia socia malsupereco. Ili promesas al ili socian egalecon je la prezo de ilia religio. Pasintjare kelkaj centoj da niaj malestimataj fratoj el la distrikto de Trichinopoly sisteme bojkotis la meson kaj la sakramentojn kaj festis pli ol 150 geedziĝojn sen pastroj sub la aŭspicioj de la « Self Respect Movement » (memrespekta movado). La kleruloj inter ili kaj precipe la junuloj avide englutas la fian kaj venenan materialon disvastigatan per certa gazetaro kaj akceptas la tendencojn de la socia malkontenteco, de la ateismo kaj de la furioza antiklerikalismo... La situacio postulas reekzamenon de nia sinteno rilate al niaj samkredanoj en la netuŝeblaj klasoj, kiuj postulas egalan traktadon en ĉiuj niaj institucioj kaj diservoj. Neniu povas nei, ke tiu deziro estas prava. Principe ĝi ĉiam estis la opinio de ĉiu, kiu havas klaran juĝon. Praktike tamen esceptoj estis tolerataj en la pasinteco en certaj lokoj. Sed oni ĉiam esperis, ke kun la plena kompreno de la katolikaj principoj kaj praktikoj la kastaj antaŭjuĝoj malaperus de si mem. Ni forigu la kastan ekskluzivecon! Per tio ni honoros nian Patrinon la Sanktan Eklezion kaj nin mem! »

*Turkaj gastoj en la memorfestoj por reĝo Jan Sobieski.* La granda Katolika Kongreso en Wien festis la repelon de la turkoj de Wien en la jaro 1683, kaj oni ne forgesis honori la memoron de la pola reĝo Jan Sobieski, kiu liberigis la urbon Wien de la turka sieĝo. La poloj mem festis sian heroon en Krakow, kie li estas entombigita en la Wawel-katedralo. Okazis kavalerifesto kun 100.000 ĉeestantoj. Je la dekstra flanko de Marŝalo Pilsudski estis — la turka ambasadoro Nahi Bey. En la bankedo, kiun prezidis Marŝalo Pilsudski, sidis je lia dekstra flanko la turka ambasadoro kaj je lia maldekstra la reprezentanto de la turka armeo, sur kies bruston Pilsudski fiksis la ordenon « Polonia Restituta ». Fine pola generalo faris longan paroladon por pola-turka amikeco : « La militoj inter ni estas finitaj, la amikeco restos. » — Nu, Turkujo ja nun estas malproksima, kaj eble la amikeco estus iom malpli tutkora, se la du landoj estus najbaroj. Tamen la ekzemplo pola-turka estas modela : Je la memortagoj pri iuj « venkoj » oni okazigu demonstracion por daŭra amikeco inter la militintaj nacioj!

**ĈU VI KREDAS, ke La Juna Batalanto estas necesa? Subtenu ĝin! Tuj pagu vian abonon kaj instigu geamikojn, ke ili ankaŭ abonu!**



# Internacia Junulara Adago.

**Katolika Junularo.**

*PAX ROMANA,* la internacia sekretariejo de la katolikaj studentaj asocioj, okazigis sian 13-an kongreson en Luxembourg (Luksemburgo) 5-11 aŭgusto 1933. 200 gestudentoj kaj profesoroj el Aŭstrujo, Belgujo, Britujo, Ĉeĥoslovakujo, Francujo, Germanujo, Hungarujo, Irlando, Italujo, Jugoslavujo (kroata kaj slovena asocioj), Litovujo, Luksemburgo, Polujo (pola kaj ukrajna asocioj), Rumanujo (hungara asocio) kaj Svisujo ĉeestis. La plej grandaj delegitaroj estis la brita kaj la luksemburga. Ĉar la germanaj asocioj estas « samdirektitaj », la plej multaj germanaj delegitoj estis nacisocialistoj. Ĉar Pax Romana konsistas el aliĝintaj naciaj asocioj, ĝi devas respekti la specialajn cirkonstancojn en la diversaj landoj. Ĉiam denove en Luxembourg oni akcentis, ke Pax Romana ne estas pacifista organizaĵo, ke ĝi ne estas internacia asocio, kiu povas doni direktivojn kaj ordonojn al la naciaj ligoj. La jarraporto diras : « ...Estas klare, ke per la fiasko de la rekonstrua klopodo sur internacia bazo ankaŭ la problemoj de la internacia agado fariĝis malpli aktualaj ol antaŭe kaj ke tial niaj naciaj asocioj havas nur plu malpli grandan intereson pri internaciaj problemoj. Krome la spertoj de ĉi tiu jaro definitive konvinkis nin, ke nuntempe multaj el niaj asocioj tute ne posedas la spiritajn kaj organizajn kondiĉojn, por realigi laborojn de ni proponitajn kaj preparitajn. Kiom ofte ekzemple depost du jaroj en nia tielnomata spirita kunlaboro ni provis instigi la asociojn al intensa okupiĝo pri la problemoj de la internacia vivo! Ni malsukcesis precipe tial ke granda parto de niaj asocioj tute ne interesiĝas pri tiaj spiritaj problemoj. Tial niaj petoj pri proponoj por studprojektoj, nia instigo, studi en la studentaj grupoj la problemon pritraktitan en la kongreso de Bordeaux « Eklezio kaj Paco » restis sensukcesaj... » Tiu honesta konstato pri la bedaŭrinda interna situacio en multaj katolikaj studentaj asocioj gvidis al la konkludo, ke en la nunaj cirkonstancoj la ĉefa tasko de Pax Romana devas esti, doni al la asocioj proponojn kaj praktikajn instigojn pri sistema eduka kaj kleriga laboro kaj peradi interŝanĝon de ideoj, spertoj kaj materialo pri tio. La internaciaj servoj, ankaŭ en la specialaj komitatoj kaj sekretariejoj (studentinoj, gazetaro, misioj, reunuiĝo de la eklezioj, sociala laboro, medicinaj fakuloj) estu laŭeble evoluigataj. Anstataŭ la internaciaj studsemajnoj, kiuj ne bone sukcesis, ĉar mankas al multaj studentoj la mono por eksterlanda vojaĝo, oni invitas la naciajn asociojn, organizi semajnfinkonferencojn internaciajn kun partopreno de la fremdaj studentoj studantaj en la koncerna lando. La kongreso pritraktis ankaŭ praktikan temon : « La sociala misio de la katolika universitatano ». Mgr. de la Serre (Paris) paroladis pri Frédéric Ozanam, fondinto de la Konferencoj de Sankta Vincento de Paŭlo, kies jubileon ni festas en la jaro 1933. Kanoniko D-ro Mack (Luxembourg) kaj Pastro Prof. Leclercq (Bruxelles) faris la du aliajn ĉefparoladojn. Poste oni aŭdis interesajn raportojn pri la studentaj Vincent-konferencoj, pri la Equipes Sociales (Socialaj Laborgrupoj) en Francujo, pri la laborservo kaj la studentaj labortendaroj en Germanujo kaj aliaj landoj, pri la katolika agado en la profesioj de advokato, kuracisto, inĝeniero. — 1934 ne okazos kongreso, sed pilgrimo al Romo, la hungaraj asocioj intencas organizi socialan studsemajnon. La sekvonta PAX ROMANA-kongreso estos 1935 en Ĉeĥoslovakujo. Kiel prezidanto estas reelektita D-ro Lambert Schaus (Luksemburgo). Oni decidis fondon de Sociala Sekretariejo de Pax Romana, kiun estros D-ro Bopp (Freiburg, Germanujo). — La kvar studsemajnoj de Pax Romana, kies organizon la lasta kongreso estis decidinta, suferis multe per la novaj politikaj cirkonstancoj en Eŭropo. La konferencoj de Krakow kaj Namur tute malebliĝis, tiuj de Heiligenkreuz kaj Solothurn havis nur malmultajn eksterlandajn partoprenantojn. La studentinoj havis tre sukcesan internacian studkonferencon en Würzburg (Germanujo).

*La Internacia Sekretariejo de la Katolika Universitata Gazetaro* (S. I. P. U. C.) havis sian duan kongreson okaze de la Pax Romana-Kongreso en Luxembourg. Multaj landoj estis reprezentitaj. Ch. Pienkowski (Polujo) prezidis, oni aŭdis interesajn raportojn de la ĉefsekretario Léon Verschave, de la direktoro Robert Dupleix kaj de usona delegito, kiu raportis pri la katolika lerneja gazetaro en Ameriko. Interesa ekspozicio pri la internacia katolika studenta gazetaro estis organizita, en kiu kompreneble ankaŭ MOKA kaj LA JUNA BATALANTO estis bone reprezentitaj. Okazis komuna tagmanĝo de la redaktoroj de la studentaj gazetoj sub prezido de Mgr. Origer, direktoro de la St. Paŭlo-Presejo kaj deputito en la luksemburga parlamento.

## Politika interkompreniĝo.

*Eksterlanda junularo konatiĝas kun la germana nacisocialismo.* En la maja numero de J. B. ni raportis pri franca-germana junulara konferenco en Paris, kie la plej multaj francaj delegitoj estis demokratoj kaj pacifistoj kaj la plej multaj germanaj delegitoj nacisocialistoj. Fine de julio 1933 okazis en Ettal (Germanujo) pli grava renkontiĝo. Faŝistoj, nacisocialistoj, demokratoj kaj socialistoj venis el Francujo, Anglujo, Italujo, Rusujo kaj eĉ Hindujo por prezenti siajn ideojn kaj lerni kompreni tiujn de la aliaj. La paroladoj pri la nacisocialismo estis farataj de la estro de la atak-taĉmentoj (S. A.), kapitano Röhm, kaj de la bavara ministro por kulturaj aferoj, Schemm. Röhm diris, ke la nacisocialismo estas esence Reĝimo de libereco kaj paco, nacia kaj internacia, inda por entuziasmigi la junan generacion. Schemm diris, ke la tuta filozofio de la nacisocialismo konsistas en la vorto « servi ». Servi la familion, la patrolandon, la homaron; subordigi sin, por pli bone doni sin; doni sin, por pli bone realigi sin. Naciismo signifas patrolandon, kaj socialismo signifas amon. Profesoro Bäumler klarigis, ke du civilizoj sin kontraŭas en Eŭropo, la norda kaj la latina. La lasta kaj plej forta klopodo de la dua, por superregi, estis la kontrakto de Versailles. Sed la horo de la justeco, de la germana dinameco venis : la vera Eŭropo naskiĝas. — En la nomo de la junaj francoj respondis Louis Vallon. Li kondamnis la naciismon, kiu malaltigas la intelektan nivelon de la popoloj kaj detruas la miljaran klopodon de la elito por leviĝi ĝis la homaro. Al la germana naciismo, kiu estas la plejaltigo de raso, li kontraŭmetis la francan patriotismon, kiu estas alkroĉiĝo al kulturo. — La faŝista Italujo ankaŭ alportis siajn tezojn sufiĉe proksimajn al la nacisocialistaj, sed pli nuancitajn. Kompreneble neniu konvinkis sian kontraŭulon. La konferenco ne kaŭzis interfratiĝon, sed valore helpis, kompreni la aliajn vidpunktojn. La junularo volas kaj devas detrui ĉiujn senbazajn antaŭjuĝojn. Se ekzistas realaj malsamecoj kaj kontraŭecoj, ili ne estu troigataj kaj fuŝataj per mensogoj kaj antaŭjuĝoj. La junularo devas servi la pacon inter la nacioj, ankaŭ inter la demokrata Francujo, la nacisocialista Germanujo kaj la faŝista Italujo. Tute malĝusta estas la sinteno de tiuj pacifistoj, kiuj prokrastas sian praktikan agadon ĝis la tempo, kiam ĉiuj nacioj havos perfektan kaj idealan politikan kaj ekonomian organizon...

*Por « juna politiko internacia ».* Demokratoj, precipe kristanaj demokratoj, el Francujo, Germanujo, Polujo, Belgujo, Italujo ktp. kunvenis fine de aŭgusto en Thonon (Francujo) en Internacia Demokrata Studkonferenco. La franca Jeune-République estis organizinta ĝin. Ankaŭ kelkaj francaj deputitoj ĉeestis. Venis deko da germanoj, preskaŭ ĉiuj elmigrintaj membroj de dissolvitaj asocioj, precipe de la Paca Ligo de Germanaj Katolikoj. Post bonegaj raportoj kaj interesa diskutado oni decidis iniciati internacian demokratan movadon, kiu nomiĝas « juna politiko internacia ». Oni faris vizitojn al Thoiry kaj Locarno kaj al Genève, kie la ĉefsekretario de la Ligo de Nacioj kaj la direktoro de la Internacia Labor-Oficejo afable akceptis la konferencanojn kaj aŭskultis kun intereso raporton pri la movado.

### MONDKONGRESO DE LA JUNULARO KONTRAŬ LA MILITO.

*La Mondkongreso de la Junularo kontraŭ Milito kaj Faŝismo* okazis en septembro en Paris kaj fariĝis, kiel ni jam en la maja numero antaŭdiris, ĉefe komunista kaj bolŝevismema afero, kvankam ankaŭ socialistaj, pacifistaj kaj kristanaj grupoj estis reprezentitaj. 1.000 delegitoj ĉeestis. Henri Barbusse faris la enkondukan paroladon. Oni ŝatis dramajn formojn, ekz. oni paroligis soldatojn en uniformo, kiuj en la nomo de siaj kolegoj promesis batalon kontraŭ la imperialista milito, delegitojn el la armiko-industrio (Schneider-Creuzot, Renault, Skoda ktp.), delegitojn el diktaturaj landoj, kiuj sukcesis transiri la landlimojn en aventure sekreta maniero ktp.. En la prezidantaron oni elektis ankaŭ Bruno Tesch, junan komuniston, kiu en Altona estis ekzekutita. Lia seĝo en la mezo de la prezidantara tablo restis malplena, kaj oni ornamis ĝin per krono de blankaj krizantemoj kun ruĝa rubando. Kiam oni eksciis, ke kvin polaj delegitoj estis arestitaj en Berlin dum la vojaĝo, oni tuj elektis ĉiujn kvin en la prezidantaron. Unu el la ĉefaj paroladoj estis tiu de la ĉefsekretario de la rusa Komunista-Leninista Junulara Asocio, Kosarev. La findemonstracio de la kongreso estis en la arbaro de Compiègne, kie 1918 la provizora paco ĉesigis la mondmiliton. En la kongreso oni multe insultis kontraŭ la burĝaj kaj socialistaj partioj kaj kontraŭ la pacifismo. En la ĉefa rezolucio oni uzas la formulon « batali kontraŭ la preparado de la imperialista milito en ĉiuj ĝiaj formoj kaj defendi la Sovetan Unuiĝon. »

**POR FARIĜI BONA ESPERANTISTO, vi devas legi Esperanto-librojn. Aĉetu ilin de la Eldonejo La Juna Batalanto!**



# Vagantaj Infanoj en Usono.

Grava agado subtenata de la ŝtataj aŭtoritatoj nun estas organizata, por kontraŭbatali la estiĝantan amasan vagadon de junaj amerikanoj serĉantaj laboron. La problemo estas treege urĝa, ĉar oni taksas la nombron de junuloj, kiuj « iris sur la straton », je pli ol 200.000. Ili migradas de urbo al urbo serĉante laboreblecon, preskaŭ ĉiam sensukcese. Do la kapitalista Ameriko venis en similan situacion kiel la bolŝevista Rusujo rilate al malzorgataj infanoj....

La ĉefa kaŭzo de tiu socia fenomeno ĝis nun nekonata en Usono estas la ekonomia krizo, la senlaboreco, kiu devigas milionojn kaj milionojn da senlaboraj gepatroj, sendi siajn filojn ankoraŭ tre junajn, por serĉi sendependan ekziston malproksime de la hejmo. Unu el tiuj vagantoj, kiu ĵus volis salti sur veturantan ŝarĝvagonaron, falis sub la radojn de vagono kaj rompis ambaŭ krurojn. La publika helpoficejo, kiu informis la gepatrojn de la junulo pri la akcidento okazinta al ilia filo, ricevis la respondon : « Preparu ĉion por enterigo. Ni ne havas monon.»

« En ĉiuj urboj, kiujn ili trakuras — klarigis antaŭ nelonge oficisto de la Oficejo por Infanoj — la junaj nomadoj serĉantaj nutraĵon kaj restejon rimarkas rapide, ke estas neeble resti pli longe ol 24 horojn. Do ili daŭrigas la vagadon, kiu fine fariĝas ĉiama okupo. En la ŝarĝvagonaroj, kie ili dormas, kaj ankaŭ en la restejoj disponigitaj al ili de la urbestraroj tiuj junuloj, el kiuj multaj apenaŭ atingis la 14-an jaron, trovas kontakton kun ĉiuj specoj de individuoj, vagabondoj, krimuloj, degenerintoj, kies morala influo estas terura.

Miloj da tiaj junuloj trakuras la landon sur la grandaj stratoj kaj petas la aŭtomobilistojn, kiujn ili renkontas, ke ili portu ilin al la plej proksima urbo: La polico ne plu arestas ilin, ĉar la malliberejoj estus nesufiĉaj, por akcepti ĉiujn.

Profesoro A. W. Mac Millen, bone konata sociologiisto en Chicago, altiras la atenton al la granda danĝero, kiun por la lando kaj ĝia socia konstruo signifas la grandiĝanta armeo de tiuj junaj homoj, kiuj estas en danĝero, fariĝi profesiaj vagabondoj. La plej multaj, li diras, estis devigitaj, foriri el sia domo, ĉar la gepatroj ne plu povas nutri kaj prizorgi ilin. La patroj diras al ili : « Mi perdis mian postenon. Kiam mi komencis, mem perlabori mian panon, mi estis multe pli juna ol vi. Bonan sukceson! » Sed la patroj ne pripensas, ke la tempoj tute ŝanĝiĝis kaj ke en la « terkultura » kaj prospera epoko de ilia juneco oni trovis multe pli facile sian vivekziston ol en ĉi tiu periodo de la krizo kaj de la troa industriigo de la lando. »

La junaj vagantoj foriras de siaj hejmoj, esperante trovi laboron « aliloke ». La aferoj fartas pli bone en la proksima urobo, ĉiam estas la « proksima urbo », pri kiu ili aŭdas paroli siajn gepatrojn kaj amikojn. Kaj ili ekveturas kiel blindaj pasaĝeroj sur ŝarĝvagonaro. Sed ilia espero estas baldaŭ trompata, kaj tio estas la komenco de neniamfinanta pilgrimado de urbo al urbo, de farmo al farmo, laŭ la sezono aŭ la informoj kolektitaj survoje.

Laŭ oficiala raporto, en la lasta vintro 35 knaboj estas trovitaj en okcidenta urbo, duone mortintaj pro malvarmo kaj suferado, en vagono por komercaĵoj. Ĉiuj devis esti portataj en hospitalon, ĉar ili havis pneŭmonion. — Laŭ aliaj raportoj la nombro de junuloj trovitaj mortintaj en vagonoj estis pli ol 50 en ses monatoj, la nombro de malsanuloj kaj kripligitoj estis kelkaj centoj...

La aŭtoritatoj preparas tutan sistemon de mezuroj por haltigi la evoluon de tiu vagado. Jam la urbestraroj ricevis instruojn, por disponigi taŭgajn ejojn al la junaj vagabondoj, por havigi al ili sufiĉan nutradon, kaj ĉefe, por provi reteni ilin, donante al ili ian okupon, anstataŭ lasi ilin migri de unu urbo al la alia...

EL « JEUNESSE OUVRIERE ». PARIS.

**EBLE TRO PEZA ŝajnas al vi la enhavo de ĉi tiu numero. Ĉar ni devis publikigi multe da raportoj pri kongresoj k. s., ni prokrastis multe da pli agrabla legaĵo por la sekvonta numero.**

# LA ESPERANTO-MOVADO.

*La 25-a Universala Kongreso de Esperanto* en Köln estis vizitata de preskaŭ 1.000 Esperantistoj. Sub la specialaj cirkonstancoj, kiuj estis retenintaj multajn vizitantojn, tio estis sukcesa rezulto. La unuecigo de la neŭtrala Esperanto-movado en Universala Esperanto-Asocio (UEA) estas definitive decidita. En la Preĝejo de Sankta Andreo okazis katolika diservo, en kiu nia amiko Pastro Wachowski, paroĥestro en Oberhausen, predikis en Esperanto. Katolika fakkunveno nur estis vizitata de ĉ. 30 personoj, niaj amikoj Frato Ansgarius Marzahn (Germanujo) kaj Jean Duffaud (Francujo) faris mallongajn paroladojn. Unu el la plej simpatiaj kongresanoj estis certe nia ĥina amiko kaj iama MOKA-sekretario Pastro Joh. Bapt. Kao O. F. M., kiu ankaŭ efike propagandis en diversaj franciskanaj monaĥejoj.

*La Skolta Jamboreo en Gödöllö* (Hungarujo) kunvenigis preskaŭ 25.000 skoltojn el la tuta mondo. Sukcese oni varbis por Esperanto, kiel vidiĝas el jena raporto de nia amiko Pastro Németh Laszlo : La 4 aŭgusto okazis la kunveno de Skolta Esperantista Ligo, ĉeestis preskaŭ 200 skoltoj el 22 landoj. La kunveno komenciĝis kaj finiĝis per preĝo, kiun mi faris. En la nomo de gekatolikoj salutis Ili Matéfi. La 8 aŭgusto okazis postkunveno, kie oni laŭtlegis la jarraportojn. En la fremduloficejo deĵoris Esperantistoj, kaj multaj sendis anoncojn en Esperanto per radio. Ankaŭ en hoteloj kaj banko oni oficiale uzis Esperanton. En la ĉiutaga jamborea gazeto « Magyar Cserkész » kelkfoje aperis Esperanto-artikoloj.

*En la Katolika Kongreso de Wien* okazis Esperanto-aranĝoj treege sukcesaj. Pro manko de loko ni povas publikigi nur parton de la informoj ricevitaj de Walter Mudrak : En salutvespero L. Chiba, prezidanto de KUE, salutis multnombran ĉeestantaron el Vieno kaj aŭstraj liglandoj kaj el Ĉeĥoslovakujo, Hispanujo, Hungarujo, Italujo, Polujo. Pastro Font-Giralt salutis nome de IKUE, registara konsilanto Steiner nome de la Esperanto-Muzeo kaj Aŭstra Esperanto-Asocio, F-ino Dandova kaj paro ĥestro Toth por la katolikaj Esperanto-ligoj de Ĉeĥoslovakujo kaj Hungarujo. Dum pilgrimo al Gugging predikis Pastro Font-Giralt. Solena diservo okazis en Karl-preĝejo. Oni preĝis kaj kantis en Esperanto, Prof. D-ro Hewera el Praha predikis. Samtempe la standardo de Katolika Unuiĝo Esperantista de Wien estis inaŭgurata. Ĝi estas dediĉita al Sankta Hildegardo, patronino de la aŭstraj katolikaj Esperantistoj. Oni atentigis speciale, ke flagoj kutime estas simboloj de sanga batalo, sed ĉi tiu flago flirtu por paco kaj amo, por Kristo la Reĝo. La festkunveno okazis lunde. Ĉeestis kiel reprezentanto de Kardinalo Innitzer Kanoniko Feichtinger. La granda okazintaĵo estis vizito de *Episkopo D-ro G. K. grafo Majlath* de Alba Julia (Rumanujo), la granda protektoro de MOKA, kiu venis en akompano de la episkopo de Linz D-ro Gföllner. Episkopo Majlath parolis entuziasmigajn vortojn por Esperanto, menciante ankaŭ la agadon de Pastro Cseh, filo de lia eparkio, kaj instigante en delikate humora maniero la episkopon de Linz, ĝis tiam skeptikulon aŭ eĉ kontraŭulon de Esperanto, por la afero. Episkopo Majlath fine donis al la Esperanto-kunveno sian specialan benon. La kunvenon prezidis S-ro Chiba, paroladis Pastro Pius Lenz O. M. Cap. pri sia samordenano Marko d'Aviano, Karl Gasperini pri « Kristo kaj la Okcidento », Pastro Meŝtan germanlingve pri la katolika Esperanto-movado. La Wiener Sängerknaben (Vienaj kantistaj knaboj), mondfama ĥoro, kaj orkestro kontribuis artan parton, fine okazis iom mallongigita prezentado de « Kunlaboro », simbola ludo de Walter Mudrak, bone konata al niaj legantoj.

*En Dunkerque* (Francujo) okazis regiona Esperanto-kongreso kun multaj eksterlandaj gastoj el Anglujo, Belgujo kaj Nederlando. En katolika diservo predikis Pastro Decoene C. Ss. R., prezidanto de la Belga Ligo de Katolikaj Esperantistoj. Li parolis pri siaj praktikaj spertoj en Kanado, kie li uzis Esperanton en la servo de la misio por homoj parolantaj 14 lingvojn kaj pri la Esperanto-propagando, kiun li faris en la jaro 1908 en la Vatikano.

*La 26-a Universala Kongreso de Esperanto* okazos 4-11 aŭgusto 1934 en la sveda ĉefurbo Stockholm. La laborkunsidoj okazos en la parlamento, la solenaĵoj en la koncertdomo, la balo en la urbdomo. Adreso por aliĝoj : Fredsgatan 4, Stockholm. La kotizo estas ĝis la 31 marto nur 20 svedaj kronoj (17 sv. fr.).

*La rektoro de la Universitato Wien,* Prof. Ernst Heinrich Tomek, diris : « Kvankam la latina lingvo restos la teologia lingvo de la katolika Eklezio, Esperanto havas la plej grandan gravecon por la katolika laika movado potence progresanta kaj tiel fariĝos la plej efika interligilo por ĉiuj katolikaj laikoj de la mondo, kiuj volas efektivigi Katolikan Agadon. »



*147 Esperanto-verkoj* aperis en la jaro 1932 : 58 lerniloj, 43 libroj pri arto kaj literaturo, 28 pri scienco, tekniko kaj religio, 5 pri organizo, 13 pri aliaj temoj. 1931 apris 138 verkoj, 1930 nur 119.

*Radio-statistiko pri 1932 :* Paroladoj pri Esperanto 7, en Esperanto 1427, programanoncoj 244, kursoj 630, kune 2308 programeroj disaŭdigitaj de 110 radio-stacioj en 19 landoj. Laŭ la statistiko la nombro de radio-disaŭdigoj ĝis fine de 1932 estis 16.977.

*La Vegetarano* estas unu el la plej bone redaktataj kaj malnovaj Esperanto-gazetoj, kiu estas tre rekomendinda al niaj multaj gelegantoj, kiuj apartenas al la vivreforma kaj vegetara movado. Redaktejo kaj eldonejo transiĝis al Rumanujo : I. Ionescu-Capatzana, BUCURESTI V, Str. Dr. Istrate, 10, Rumanujo.

*Esperanto en Germanujo.* La Germana Esperanto-Asocio havis en Köln sian jarkunvenon. La samdirektigo en la nacisocialista senco estas decidita. Tamen apud GEA fondiĝis nova Nacisocialista Germana Esperanto-Ligo, gvidata de personoj ĝis nun tute nekonataj en la Esperanto-movado. Laŭ la statuto la celo de la nova ligo estas, « kontraŭbatali la judan-marksistan abomenaĵpropagandon » kaj disvastigi Esperanton en Germanujo.

*En Hispanujo* okazis la X-a Kongreso de Hispana Esperanto-Asocio en Santander. En la listo de la aliĝintoj troviĝas kelkaj politikaj grupoj, inter ili la Socialista Junulara kaj la Komunista Junularo de Santander. — La XVI-a Kataluna Esperanto-Kongreso okazis en Vendrell. En katolika diservo predikis Pastro Marti Albanell. Samtempe okazis kunsido de liberpensuloj, kiu decidis sendi al la kataluna registaro peticion, « ke la laikaj leĝoj estu severe plenumataj kaj ke la bapto de senkonsciaj infanoj estu malpermesata ». Ĉu vere faka kunsido de neŭtrala Esperanto-kongreso estas taŭga okazo por io tia? Rimarkinde kaj bedaŭrinde estas, ke inter la subskribintoj de tiu dokumento troviĝas preskaŭ ĉiuj gvidantoj de la Kataluna Esperantista Federacio (prezidanto, sekretario, redaktoro ktp.).

*La Ligo de Katolikaj Esperantistoj en Ĉeĥoslovakujo* okazigis sian ĝeneralan kunvenon en la kadro de la ĉeĥoslovaka katolika junulara kongreso en Praha la 1 julio 1933. Malfermis kaj prezidis Episkopo D-ro Eltschkner, lia parolado restos al ĉiuj neforgesebla. Jen la fino : « Por Kristo nia Reĝo ni batalos, por Kristo nia Reĝo ni eble falos, antaŭen do en nom' de Dio! ». Sekvis referatoj, i. a. de F-ino L. Dandova pri « internacia katolika kunlaboro », de Jan Filip pri « Esperanto kaj la junularo », MOKA estis menciata en ambaŭ paroladoj. Plue okazis raportoj pri la misia demando (L. Pensova) kaj pri la gazetara tasko (Kozel). Pastro D-ro Hewera alvokis al nepra kunlaboro de ĉiuj katolikaj Esperantistoj ĉeĥoslovakaj sen diferenco de nacieco. Multaj teologistudantoj partoprenis.

# NIA MOVADO.

**Internacia Oficejo.**

*Korespondservo.* Ni ripetas, ke ni peradas korespondadon. Kiu deziras korespondanton eksterlandan, sciigu nomon, adreson, aĝon, profesion, lingvokonojn kaj specialajn dezirojn kaj aldonu respondkuponon. Lasttempe ni ankaŭ ricevis multajn korespondproponojn por naciaj lingvoj (ĉefe angla, franca kaj germana) el Belgujo, Germanujo, Irlando, Kanado kaj Usono.

*Vizitantoj* en la nova ĉefsekretariejo estis jam multnombraj. Unu dimanĉon ni havis eĉ 4 vizitantojn samtempe (2 belgojn kaj 2 germanojn).

*Nia plej granda zorgo* estas nun La Juna Batalanto. Pagu frutempe vian abonon, donacu por la speciala kolekto, varbu novajn abonantojn!

*Vojaĝoj.* Komence de 1934 la internacia sekretario estos en Anglujo.

**Aŭstrujo.**

*La nacia sekretario* W. Mudrak estis tre agema okaze de la Katolika Kongreso kaj estis tre ĝoja, havi okazon, paroli kelkajn vortojn kun la alta protektoro de MOKA, episkopo Majlath. Ankaŭ pri La Juna Batalanto li iom parolis kun la episkopo. En la granda festkunveno, kie episkopo Majlath kune kun Kardinalo Verdier, Kardinalo Hlond, Kardinalo Séredi, episkopo Schinzel kaj P. W. Schmidt S. V. D. paroladis, li precipe adresiĝis al la junularo, i. a. alvokante ĝin, teni sin libera de alkoholo kaj tabako. Pri la Esperanto-programo ni raportas aliloke.

*La Paca Ligo de Aŭstraj Katolikoj* okazigis amikan kunvenon kun diverslandaj gastoj sub prezido de D-ro M. Maresch, la *Internacia Katolika Ligo kontraŭ la Alkoholismo* havis kunvenon sub prezido de Episkopo D-ro Waitz de Feldkirch. Pastro Terwischa van Scheltinga, sekretario de la Internacia Ligo (Nederlando), Mgr. D-ro Schneider (Wien) kaj deputitino O. Rudel-Zeynek (Graz) paroladis.

**Belgujo.**

*Novaj fervoraj delegitoj* de MOKA estas Jacques Broussier (Braine l'Alleud) kaj Ant. De Troeyer (Arendonk). La unua speciale propagandas inter la skoltoj, la lasta starigis Esperanto-klubeton kun ok junaj katolikoj en sia vilaĝo. Nia amiko Van Gulck (Antwerpen), Esperanto-sekretario de la katolikaj skoltoj, bonvolis transdoni MOKA-literaturon kun La Juna Batalanto al Kardinalo Van Roey. Nia internacia sekretario estas en daŭraj bonaj rilatoj kun katolikaj junularaj asocioj.

**Ĉeĥoslovakujo.**

*En la katolika Esperanto-konferenco* okaze de la junulara kongreso nia amiko Jan Filip paroladis pri « Esperanto kaj junularo », nia aŭstra sekretario Mudrak troviĝis inter la gastoj.

*En Nitra* estis Esperanto-kunveneto okaze de la grandaj jubileaj festoj (vidu la antaŭajn numerojn de J. B.), amiko Mudrak ĉeestis. En la ĉefkunveno de la Slovaka Katolika Skolta Ligo li estis oficiale salutata kiel reprezentanto de MOKA.

*Novy Jičin.* Pastro Pokorny komencis Esperanto-kurson kun 25 partoprenantoj ĉeĥaj kaj germanaj.

**Francujo.**

*La nacia sekretario* Muffang eldonis ĝis nun 4 numerojn de la franclingva MOKA-bulteneto « Le Lien ».

*La internacia sekretario* ĉeestis la Socialan Semajnon de la francaj katolikoj en Reims kaj la studsemajnon de AD LUCEM. En ambaŭ okazoj li disdonis multe da materialo.

*La germana sekretario* kun akompananto vizitis amikojn en diversaj francaj regionoj, speciale en Paris. Li ĉeestis en la katolika studenta tendaro en la pireneoj, pri kiu ni publikigas specialan artikoleton en ĉi tiu numero. Ni rekomendas ĝin al la atento de niaj legantoj.

**Germanujo.**

*La landa asocio de MOKA* ĉesigis sian funkciadon la 1 aprilo kaj nun ne plu ekzistas. La praktikaj servoj laŭeble estas daŭrigataj. Tri komitatanoj bonvolis akcepti ilian prilaboron : Vojaĝservo kaj gazetarservo : Heinz Kolvenbach, Düsseldorf, Stoffeln 23; Internacia Korespondservo : Conrad Thoonen, Düsseldorf, Albertstr. 111; Esperanto-servo : Peter Klein, Essen, Planckstr. 117. Pri organizaj aferoj de MOKA bonvolu skribi nur al la internacia sekretariejo. Tiuj grupoj de MOKA, kiuj ne dissolviĝis, fariĝis tute sendependaj. Pri la eblecoj de estonta agado ni ankoraŭ skribos. Ĉiukaze la Esperanto-propagando kaj la varbado por La Juna Batalanto devas esti daŭrigataj.

**Ĥinujo.**

*Nia nacia sekretario* Pastro Paŭlo Ch' ang S. S. raportis jenon : La katolika semajna gazeto Socia Feliĉeco estas favora al Esperanto, ĝi publikigis novaĵojn pri la MOKA-movado. Per ĉi tiu gazeto ni eble kunigos la ĥinajn katolikajn Esperantistojn el diversaj provincoj. Ĉi tie ekzistas multaj heroaj junuloj kaj senlacaj pioniroj de la katolika movado. Ili volas ĉion renovigi, sed pro manko de organizita unuigo unu ne helpas la alian. La sekretario volas kunigi junulojn en Studenta Esperantista Grupeto. Ni decidis, ke nia sekretariejo devos esti centro de informado kaj ligilo inter diverslandaj movadoj kaj gvidantaj direktoroj, kaj devos okazigi kunvenon de grupoj de la katolika junulara movado. Profunde en nia nacio kuŝas la milito, tial nia nacia junularo devos ĉie komenciĝi per tio, kion ni faras kaj postulas. Sole ĉi tio estas reala rimedo kontraŭ la malamikeco. Tiu, kiu ĉi tiun taskon faras, defendas, liberigas kaj vivigadas la nacion. Sekretaria adreso : Fr. Paŭlo Ch' ang, Pu-ŝien, Shan-si. Ĥinujo.

**Japanujo.**

*Esperanton propagandi inter japanaj katolikoj* volas nia korespondanto Jozefo T. Tanuma, kiu estas profesoro por franca lingvo en la Katolika Universitato de Tokio. Kvankam li nur antaŭ nelonge Esperantistiĝis, li jam skribis al ni longan leteron en admirinde korekta Esperanto. Jen kelkaj frazoj el lia letero : « Mi kredas, ke ni japanaj katolikoj devas lerni Esperanton kaj disvastigi ĝian uzadon, ĉar tiu mirinda lingvo plifaciligos multe la laboron de eŭropaj misiistoj en Japanujo. Nuntempe misiistoj, kiuj venas el tre diversaj eŭropaj landoj, trovas, ke la malfacileco de la japana lingvo estas unu el la plej gravaj baroj kontraŭ la katolika misio... Mi intencas propagandi Esperanton inter katolikaj japanoj kaj fondi Japanan Ligon de Katolikaj Esperantistoj. Mi volas publikigi artikolojn pri la Esperanto-movado en niaj katolikaj revuoj... »